

13 FALO DE LA GENTO VOTICKÝ

Iun tagon venis en oficejon de policoficisto d-ro Mejzlík ia nealta homo kun oraj okulvitroj kaj zorgoplena vizaĝo. "Arkivisto Divíšek," li ekmurmuris. "Sinjoro doktoro, mi venas por konsulti vin... kiel eminentan kriminaliston; nome oni diris al mi, ke vi moştas esti... iel... speciale se temas pri la pli komplikaj kazoj - Nome tio estas neordinare mistera kazo," li deklaris emfaze.

"Nur diru, pri kio temas," diris d-ro Mejzlík, prenante en la manon krajonon kaj notblokon. "Oni devus enketi," impetis arkivisto Divíšek, "kiu murdis sinjoron Petron Berkovec, kiel mortis lia frato Henriko kaj kio okazis kun lia edzino Katarina." "Berkovec Petro," rememoris d-ro Mejzlík, "miascie, ĉi tie ni havas nenion raporton pri lia morto. Vi volas prezenti denuncon, ĉu?" "Tute ne," diris sinjoro arkivisto. "Nome mi turniĝas je vi sole pri konsilo, sciu? Devis okazi io terura." "Kiam ĝi okazis?" helpis al li d-ro Mejzlík. "Mi petas unue daton." "Nu ja en la jaro mil kvarcent sesdek kvin," diris sinjoro Divíšek, riproče rigardante tra okulvitroj la policoficiston. "Tion vi devus scii, sinjoro: dum la benata regado de reĝo Georgo de Poděbrady."

"Aha," diris d-ro Mejzlík kaj formesis la notblokon kaj krajonon. "Do, kara sinjoro," li parolis kun okulfrapa ĝentileco, "por tiu kazo pli taŭgas doktoro Knobloch." Sciu, li estas polickuracisto. "Mi venigos lin al vi, jes?"

Sinjoro arkivisto morniĝis. "Domaĝe," li diris, "oni tiom rekomendis vin al mi. Sciu, ĝuste mi preparas historian verkon pri la regado de Georgo de Poděbrady, kaj ĉe tio mi stumblis, jes, stumblis pri la afero, super kiu mi estas senkonsila."

Nedanĝera, decidiĝis d-ro Mejzlík. "Kara sinjoro," li diris rapide, "mi timas, ke ne multe mi helpos al vi. Por konfesi al vi, en la historio mi estas tro malforta." "Tio estas eraro," opiniis severe sinjoro Divíšek. "La historion vi devus scii.

13 PÁD RODU VOTICKÝCH

Jednoho dne přišel do kanceláře policejního úředníka dr. Mejzlíka takový pomenší člověk se zlatými brejlemi a ustaranou tváří. "Archivář Divíšek," zamumlal. "Pane doktore, já k vám jdu na poradu... jako k vynikajícímu kriminalistovi; mně totiž řekli, že vy račte být... jaksi... zvláště pokud jde o složitější případy – Totiž to je neobyčejně záhadný případ," prohlásil důklivě.

"Jenom řekněte, oč jde," pravil dr. Mejzlík, bera do ruky tužku a poznámkový blok. "Mělo by se vyšetřit," vyhrkl archivář Divíšek, "kdo zavraždil toho pana Petra Berkovce, jak zemřel jeho bratr Jindřich a co se stalo s jeho chotí Kateřinou." "Berkovec Petr," vzpomínal dr. Mejzlík, "pokud vím, nemáme tady o jeho smrti žádné hlášení. Vy chcete podat udání, že?" "Ale ne," řekl pan archivář. "Totiž já se k vám obracím jenom o radu, víte? Muselo se stát něco strašného." "Kdy to bylo?" pomáhal mu dr. Mejzlík. "Prosím, nejdřív datum." "Nu přece roku čtrnáct set šedesát pět," pravil pan Divíšek, kárvavě pohlížeje přes brýle na policejního úředníka. "To byste měl vědět, pane: za požehnané vlády krále Jiříka z Poděbrad."

"Aha," řekl dr. Mejzlík a odhodil blok a tužku. "Tak, milý pane," mluvil s nápadnou přívětivostí, "na tenhle případ je spíš doktor Knobloch." Abyste věděli, to je policejní lékař. "Já vám ho zavolám, ano?"

Pan archivář se zasmušil. "To je škoda," řekl, "mně tak doporučovali vás. Víte, já právě chystám historické dílo o vládě Jiříka z Poděbrad, a přitom jsem klopýtl, ano, klopýtl o takovou věc, se kterou si nevím rady."

Neškodný, rozhodl se dr. Mejzlík. "Milý pane," řekl honem, "já se obávám, že vám nebudu mnoho platen. Abych se vám přiznal, v dějinách jsem příliš slabý." "To je chyba," mínil přísně pan Divíšek. "Dějiny byste měl znát.

Sed eĉ, sinjoro, se la kompetenta historia materialo ne estas al vi konata el la unua fonto, mi citos al vi ĉiujn konstatitajn cirkonstancojn; bedaŭrinde ili estas malmultaj. En la unua vico estas ĉi tie la letero de sinjoro Ladislao Pcháč de Olešná al sinjoro Jan Boršovský de Čerčany. Tiu letero certe estas al vi konata." "Mi petas, ne estas," konfesis d-ro Mejzlík kun pentmieno de malbona lernanto.

"Sed homo," eksplodis sinjoro Divíšek indigně, "tiun leteron ja publicis jam antau dek sep jaroj historiisto Šebek en sia Epitomo el Historio, almenaŭ tion vi povus scii! Sed," li aldiris, rektmetante la okulvitrojn, "nek Šebek, nek Pekař, nek Novotný aŭ iu alia dediĉis al tiu letero necesan atenton. Kaj ĝuste tiu letero, kiun ja vi devus koni, kondukis min al spuro de tiu kazo." "Aha," diris d-ro Mejzlík. "Do plue." "Unue la letero," diris sinjoro arkivisto. "La tekston bedaŭrinde mi ne havas ĉi tie, sed nur unu mencio rilatas nian kazon; tie nome Ladislao Pcháč skribas al sinjoro Boršovský, ke lia, nome onklo de sinjoro Jan, sinjoro Ješek Skalický de Skalice, en la jaro de la Sinjoro 1465 ne estos atendata en la kortego de Praga, ĉar Lia Reĝa Majesto propramane taksis al sinjoro Ješek, post fatalaj agoj en Votice Velenova, kiel diras la korespondanto, ne plu venadi al la reĝa kortego kaj sian kolereksplodemon penti ĉe Dio kaj la Dian justecon atendi.

Do komprenu," klarigis sinjoro arkivisto, "ni dirus, ke Lia Majesto la reĝo restadigis sinjoron Ješek al lia posedajo kaj bieno. Sinjoro, ĉu estas al vi io okulfrapa?" "Provizore ankoraŭ ne," diris d-ro Mejzlík, desegnante dume sur papero admirindan spiralon. "Aha," ekvokis sinjoro Divíšek triumfe. "Vidu, Šebek ankaŭ tion ne rimarkis. Do ege okulfrapa, sinjoro, estas la cirkonstanco, ke Lia Majesto la reĝo ne venigas sinjoron Ješek - pro kia ajn fatala ago - antaŭ la regulan laikan tribunalon, sed rekomendas lin al la Dia justeco. Lia Majesto per tio evidente vidigas," diris sinjoro arkivisto kun videbla respekteto, "ke la fatalaj agoj estas de tia karaktero, ke la regnestro mem ekskluzivas ilin el la laika justeco.

Ale i když, pane, vám příslušný historický materiál není znám z první ruky, já vám uvedu všechny zjištěné okolnosti; bohužel je jich málo. V první řadě je tu ten dopis pana Ladislava Pcháče z Olešné panu Janu Boršovskému z Čerčan. Ten dopis je vám ovšem znám." "Prosím není," přiznával se dr. Mejzlík se zkroušeností špatného žáka.

"Ale člověče," vybuchl pan Divíšek pohoršen, "ten dopis přece publikoval už před sedmnácti lety historik Šebek ve svých Regestech, aspoň to byste mohl vědět! Jenže," dodával naravnávaje si brýle, "ani Šebek, ani Pekař, ani Novotný, ani nikdo jiný nevěnoval tomu dopisu patřičné pozornosti. A právě ten dopis, který byste ovšem měl znát, mne uvedl na stopu toho případu." "Aha," řekl dr. Mejzlík. "Tak dál." "Nejdřív ten dopis," pravil pan archivář. "Já tu jeho text bohužel nemám, ale jenom jedna jeho zmínka se týká našeho případu; on tam totiž pan Ladislav Pcháč píše panu Boršovskému, že jeho, totiž pana Jana strýc, pan Ješek Skalický ze Skalice, toho léta Páně 1465 není čekán na dvoře v Praze, jelikož Jeho Milost královská vlastní rukou panu Ješkovi po těch neblahých skutcích na Votici Velenově", jak praví korespondent, uložila na dvůr královský nadále nechoditi a prchlivosti své Pánu Bohu želeti a spravedlivosti boží čekati.

Tedy rozumíte," vykládal pan archivář, "my bychom řekli, že Jeho Milost král pana Ješka konfinoval na jeho zboží a statcích. Pane, není vám něco nápadné?" "Zatím ještě ne," řekl dr. Mejzlík, kresle přitom na papíře podivuhodnou spirálu. "Aha," zvolal pan Divíšek vítězně. "Vidíte, Šebek si toho také nevšiml. Tedy velmi nápadná, pane, je ta okolnost, že Jeho Milost král nevolá pana Ješka – ať už pro jakékoliv neblahé skutky – na řádný světský soud, nýbrž doporučuje ho boží spravedlnosti. Jeho Milost tím dává zřejmě najevo," děl pan archivář s patrnou úctou, "že ty neblahé skutky jsou takového rázu, že je sám panovník vyjímá ze světské spravedlnosti.

Se vi konus Lian Majeston, sinjoro, vi vidus, ke ĝi estas nepre neordinara kazo; reĝo Georgo, karmemora, ege zorgis pri la regula kaj severa plenumado de la justeco." "Eble li timis sinjoron Ješek," opiniis d-ro Mejzlík. "Mi petas vin, dum liaj tempoj -"

La arkivisto ekscite eksaltis. "Sinjoro," li balbutis, "kion vi diras? Reĝo Georgo timus iun? Kaj eĉ iun el la nuraj kavaliroj?" "Do ĝi estas ia protekto," diris d-ro Mejzlík. "Sciu, ĉe ni -" "Nenia protekto," ekkriis sinjoro Divíšek tute punca. "Dum reĝo Vladislao eble vi povus paroli pri protekto, sed sub reĝo Georgo, ne, sinjoro, ĉe tiu vi ne sukcesus per protekto! Tiu pelus vin!"

Sinjoro arkivisto iom trankviliĝis. "Nenia protekto. Sinjoro, evidente devis esti io eksterordinara en la fatalaj agoj, ke Lia Majesto la reĝo lasis ilin al la Dia justeco." "Kaj kiaj agoj tio estis?" ekĝemis d-ro Mejzlík. Sinjoro arkivisto Divíšek ekmiris. "Tion vi ja devas trovi al mi," li diris mirigite. "Kial vi estas kriminalisto? Ĝuste tial mi iras al vi!" "Pro ĉio en la mondo," defendis sin d-ro Mejzlík, sed la arkivisto ne lasis lin finparoli.

"Unue vi devas scii faktojn," li diris instrue. "Kiam do mi rimarkis la neklaran aludon, mi komencis esplori la fatalajn agojn en Votice Velenova. Bedaŭrinde konserviĝis neniu enskribo; sed en preĝejo de Votice Velenova mi trovis sarkofagon de sinjoro Petro Berkovec, kaj tiu ŝtono, sinjoro, estas ĝuste el la jaro 1465! Sciu; sinjoro Petro Berkovec estis bofilo de sinjoro Ješek Skalický; li prenis kiel edzinon lian filinon Katarina. Jen foto de la sarkofago - ha, ĉu vi vidas ion atentindan?" "Ne," diris d-ro Mejzlík, rigardante de ambaŭ flankoj foton de la sarkofago, sur kiu estis skulptita iu kavaliro kun la manoj kunmetitaj sur la brusto kaj ĉirkaŭe surskribo per gotika frakturo. "Atendu, ĉi tie en angulo estas fingra premsigno." "Eble ĝi estas de mia fingro," diris la arkivisto, "sed atentu ĉi tiun surskribon." "Anno Domini MCCCCLXV," legis pene d-ro Mejzlík. "Jaro de Sinjoro 1465. Tio estas jaro de la morto de tiu sinjoro, ĉu?" "Kompreneble, sed ĉu nenion vi vidas?

Kdybyste Jeho Milost znal, pane, viděl byste, že to je naprosto nevšední případ; král Jiří blahé paměti tuze držel na řádné a přísné konání spravedlnosti." "Snad se pana Ješka bál," mínil dr. Mejzlík. "Prosím vás, za těch jeho časů –"

Archivář Divíšek pobouřeně vyskočil. "Pane," koktal, "co to říkáte? Král Jiří že by se někoho bál? A dokonce někoho z pouhých rytířů?" "Tak to byla nějaká protekce," řekl dr. Mejzlík. "To víte, u nás –" "Žádná protekce," křikl pan Divíšek celý rudý. "Za krále Vladislava byste snad mohl mluvit o protekci, ale za krále Jiříka, to ne, pane, na toho byste si s protekcí nepřišel! Ten by vás hnál!"

Pan archivář se poněkud uklidnil. "Žádná protekce. Pane, tady zřejmě muselo být něco zvláštního na těch neblahých skutcích, že Jeho Milost král je ponechal boží spravedlnosti." "A jaké to byly skutky?" vzdychl dr. Mejzlík. Pan archivář Divíšek se podivil. "To přece vy mně máte nalézt," povídal užasle. "Načpak jste kriminalista? Proto právě k vám jdu!" "Propánakrále," bránil se dr. Mejzlík, ale archivář ho nenechal domluvit.

"Nejdřív musíte znát fakta," řekl poučně. "Když tedy jsem si všiml té nejasné narázky, začal jsem pátrat po těch neblahých skutcích na Votici Velenově. Bohužel se nezachoval žádný zápis; ale zato jsem v kostele na Votici Velenově našel náhrobní kámen pana Petra Berkovce, a ten kámen, pane, je právě z roku 1465! Víte, on pan Petr Berkovec byl zeť pana Ješka Skalického; pojď totiž za manželku jeho dcery Kateřiny. Tady je fotografie toho náhrobku – aha, nepozorujete nic zvláštního?" "Ne," řekl dr. Mejzlík, prohlížeje z obou stran fotografii náhrobního kamene, na němž byl vytěsnán nějaký rytíř s rukama složenýma na prsou a dokola nápis gotickou frakturou. "Počkejte, tady v rohu je otisk prstu." "To snad je od mého prstu," pravil archivář; "ale všimněte si tady toho nápisu!" "Anno Domini MCCCCLXV," četl s námahou dr. Mejzlík. "Léta Páně 1465. To je letopočet smrti toho pána, ne?" "To se rozumí, ale nevidíte nic?"

Kelkaj literoj estas evidente pli grandaj, rigardu!" Kaj rapide li skribis per krajono: "ANNO DOMINI MCCCCLXV." - "Tiu skulptisto intence elcizis literojn O, C kaj C pli grandaj; tio estas kriptogramo, ĉu vi komprenas? Skribu la literojn OCC - ĉu venas al vi neniu ideo?" "OCC, OCC," murmuris d-ro Mejzlík, "tio povus esti - ha, mallongigo de OCCISUS, ĉu? Tio signifas murdita!"

"Jes," elvokis solene la arkivisto. "La skulptisto indikis per tio al la posteularo, ke la nobela sinjoro, sinjoro Petro Berkovec de Votice Velenova estis inside murdita. Jen ni ĝin havas!" "Kaj murdis lin lia bopatro, tiu Ješek Skalický," deklaris d-ro Mejzlík en subita historia ilumino. "Absurdaĵo," diris sinjoro Divišek malšate. "Se sinjoro Ješek murdus sinjoron Berkovec, vokus lin Lia Majesto al la kriminala tribunalo. Sed ankoraŭ ne estas ĉio: Tuj apud la sarkofago estas la dua, sub kiu ripozas Henriko Berkovec de Votice Velenova, frato de sinjoro Petro; kaj sur la sarkofago estas la sama jarkalkulo 1465, sed sen kriptogramo! Kaj sinjoro Henriko sur la sarkofago havas glavon en la mano; la skulptisto videble volis komprenigi, ke li mortis en honesta batalo. Kaj nun, pro Dio, diru al mi, kiel tuj du mortoj kune koneksas!" "Eble ĝi estas nur hazardo," opiniis d-ro Mejzlík necerte, "ke tiu Henriko perdis la vivon samjare -"

"Hazardo," ekkriegis la arkivisto incitite. "Sinjoro, ni, historiistoj, agnoskas neniu hazardon! Kien ni venus, se ni allasus, ke io okazis hazarde? Ĉi tie devas esti ia kaŭza rilato! Kaj ankoraŭ tio ne estas ĉio. Jaron poste, 1466, mortis pie sinjoro Ješek Skalický; kaj mi petas, lia posedajo Skalice kaj Hrádek transiris testamente al lia kuzo, nomata sinjoro Jan Boršovský de Čerčany. Ĉu vi scias, kion ĝi signifas? Tio signifas, ke lia filino Katarina, kiun, kiel ĉiu infano scias, edzinigis al si en la jaro 1464 la sama sinjoro Petro Berkovec, ankaŭ jam ne plu vivis! Kaj ĉi tiu sinjorino Katarina, mi petas, havas nenie sarkofagon! Volu permesi, ĉu ankaŭ tio estas hazardo, ke sinjorino Katarina absolute malaperas al ni tuj post morto de sia edzo? Kio? Tion, sinjoro, vi nomas hazardo?

Některá písmena jsou zřejmě větší, koukejte se!" A rychle napsal tužkou: ANNO DOMINI MCCCCLXV. "Ten sochař vytesal schválně písmena O, C a C větší; to je kryptogram, rozumíte? Napište si ta písmena OCC – nenapadá vás nic?" "OCC, OCC," bručel dr. Mejzlík, "to by mohlo být – aha, zkratka za OCCISUS, že? To znamená zavražděn!"

"Aho," zvolal slavnostně archivář. "Sochař tím naznačil potomstvu, že urozený pán pan Petr Berkovec de Wotice Welenova byl úkladně zavražděn. Tady to máme!" "A zavraždil ho jeho tchán, ten Ješek Skalický," prohlásil dr. Mejzlík v náhlém historickém osvícení. "Nesmysl," řekl pan Divišek s opovržením. "Kdyby pan Ješek zavraždil pana Berkovce, volala by ho Jeho Milost na hrdelní soud. Ale to není všechno, pane: Hned vedle tohohle náhrobku je druhý, pod kterým odpočívá Henricus Berkovec de Wotice Welenova, bratr pana Petra; a na tom náhrobku je týž letopočet 1465, jenže bez kryptogramu! A pan Jindřich na tom náhrobku má v rukou meč; sochař chtěl patrně naznačit, že zemřel v čestném boji. A teď mně, proboha, povězte, jak ty dvě smrti spolu souvisí!" "Snad je to jen náhoda," mínil dr. Mejzlík nejistě, "že ten Jindřich přišel o život téhož roku –"

"Náhoda," zařval archivář podrážděně. "Pane, my historikové žádnou náhodu neuznáváme! Kam bychom přišli, kdybychom připustili, že se něco stalo náhodou? Tady musí být nějaký příčinný vztah! Ale to pořád ještě není všechno. Rok nato, 1466, zemřel v Pánu pan Ješek Skalický; a prosím, jeho zboží Skalice a Hrádek připadly dědictvím jeho sestřenci, řečenému panu Janu Boršovskému z Čerčan. Víte, co to znamená? To znamená, že jeho dcera Kateřina, kterou, jak ví každé dítě, pojala roku 1464 týž pan Petr Berkovec za ženu, už také nebyla naživu! A tahle paní Katuše, prosím, nemá nikde žádný náhrobek! Račte dovolit, to je také náhoda, že paní Katuše nám naprostoto mizí hned po smrti svého manžela? Co? Tomu, pane, říkáte náhoda?"

Kaj kial ŝi ne havas sarkofagon, kial? Ĉu hazardo? Aŭ ĝuste tio estas la fatalaj agoj, pro kiuj Lia Majesto la reĝo rekomendis al sinjoro Ješek la Dian justecon?" "Tio estas tute ebla," opiniis d-ro Mejzlík kun iom pli granda intereso. "Tio estas tute certa," deklaris sinjoro Divíšek, allasante neniajn dubojn. "Kaj nun temas, komprenu, pri tio, kiu kiun mortigis kaj kiel ĉio ĉi koneksas. Morto de sinjoro Ješek ne interesas nin, ĉar la 'fatalaj agojn' li transvivis; alie la reĝo Georgo ne ordonus al li, ke li pentu ilin antaŭ Di-sinjoro. Ni konstatu, kiu mortigis sinjoron Petron, kiel perdis la vivon sinjoro Henrico, kien malaperis sinjorino Katarina kaj kion komunan kun ĉio ĉi havis sinjoro Ješek Skalický."

"Atendu," diris d-ro Mejzlík, "ni skribos la personojn: 1. Petro Berkovec - murdita; 2. Henrico Berkovec - pereis en batalo, ĉu? 3. Katarina - malaperis senspure; 4. Ješek Skalický - lasita al la Dia justeco. Ĉu estas tiel?" "Estas," diris la arkivisto, atente palpebrumante. "Sed vi devus nomi ilin sinjoro Petro Berkovec, sinjoro Ješek kaj simile. Do plue." "Ĉe tio vi ekskludas," meditis d-ro Mejzlík, "ke tiu Ješek murdus sian bofilon Petron Berkovec, ĉar tiukaze li estus starigita antaŭ asizan tribunalon." "Venigita antaŭ la reĝan tribunalon," korektis la arkivisto. "Alie ĝi estas ĝusta." "Do atendu: poste restas al ni nur frato de Petro, Henrico. Plej versimile Henrico murdis sian fraton."

"Ne eblas," murmuris la arkivisto. "Se li murdus sian fraton, oni ne konstruu al li en preĝejo sarkofagon - almenaŭ ne tuj apude." "Aha. Do Henrico nur dungis murdanton je sia frato kaj poste mem pereis en batalo, ĉu?" "Kial poste sinjoro Ješek ricevas de la reĝo riproĉon pro sia koleregemo?" opiniis la arkivisto, malkontente agitiĝante. "Kaj kien malaperis Katarina, he?" "Jen, vero," murmuris d-ro Mejzlík. "Aŭskultu, tio estas komplika kazo. Nu, ni supozu, ke tiu Petro trafis Katarinan in flagranti kun Henrico kaj mortigis ŝin. Tion eksciis ŝia patro kaj en kolero murdis sian bofilon."

A proč nemá náhrobek, co? Náhoda? Nebo právě to jsou ty neblahé skutky, pro které Jeho Milost král doporučoval panu Ješkovi spravedlnost boží?" "To je docela možné," mínil dr. Mejzlík s poněkud větším zájmem. "To je docela jisté," prohlásil pan Divíšek, nepřipouštěje žádných pochyb. "A ted' jde, rozumíte, o to, kdo koho zabil a jak to všechno souvisí. Smrt pana Ješka nás nezajímá, protože ‚ty neblahé skutky‘ přežil; jinak by mu král Jiří neukládal, aby jich Pánu Bohu ževel. My máme zjistit, kdo zabil pana Petra, jak přišel o život pan Jindřich, kam se poděla paní Kateřina a co s tím vším měl co dělat pan Ješek Skalický."

"Počkejte," řekl dr. Mejzlík, "napíšeme si osoby: 1. Petr Berkovec – zavražděn; 2. Jindřich Berkovec – zahynul v boji, že ano? 3. Katuše – zmizela beze stopy; 4. Ješek Skalický – ponechán spravedlnosti boží. Je to tak?" "Je," řekl archivář pozorně mrkaje. "Ale měl byste říkat pan Petr Berkovec, pan Ješek a podobně. Tak dál." "Přítom vylučujete," přemýšlel dr. Mejzlík, "že by ten Ješek zavraždil svého zetě Petra Berkovce, protože v tom případě by byl postaven před porotu." "Pohnán před královský soud," opravoval archivář. "Jinak je to správně." "Tak počkejte: pak nám zbývá jenom Petrův bratr Jindřich. Nejspíš Jindřich zavraždil svého bratra.

"To není možno," bručel archivář. "Kdyby zavraždil svého bratra, nepostavili by mu v kostele náhrobek – aspoň ne hned vedle." "Aha. Tedy Jindřich jenom zjednal vraha na svého bratra a sám pak zahynul v nějakém boji, ne?" "Proč by potom pan Ješek dostal od krále důtku za svou prchlivost?" mínil archivář nespokojeně sebou vrtě. "A kam se nám poděla Kateřina, he?" "To je pravda," bručel dr. Mejzlík. "Poslouchejte, to je složitý případ. Tak dejme tomu ten Petr zastihl Kateřinu in flagranti s Jindřichem a zabil ji. To se dozvěděl její otec a v hněvu zavraždil svého zetě."

"Ankaŭ tio ne eblas," oponis sinjoro Divíšek. "Se sinjoro Petro mortigus Katarinan pro adulto, do ŝia patro kun tio nur konsentus. Mia kara, tiam oni estis severaj je tio." "Do atendu," meditis d-ro Mejzlík. "Ni diru, ke li mortigis ŝin nur senintence; eble li disputis kun ŝi -" "Poste ja oni konstruas al ŝi sarkofagon," kapskuis la arkivisto. "Neeble. Sinjoro, jam la tutan jaron mi cerbumas super tio, kaj ĝi ne harmonias al mi."

"Hm," diris d-ro Mejzlík, rigardante mediteme tiun etan nomaron. "Kia malbena afero. Eble, ke mankas al ni iu kvina." "Kion vi farus kun la kvina?" diris riproĉe sinjoro Divíšek. "Ja eĉ kun la kvar vi estas senkonsila?" "Do poste devis esti iu el tiuj du, kiu mortigis tiun Berkovec: aŭ lia bopatro aŭ lia frato -

Sed, sakre," li ekkriis subite, "aŭskultu, ŝi faris tion, tiu Katarina!" "Jesuo," ekvortis la arkivisto deprimit, "je tio eĉ pensi mi ne volis! Jesuomaria, ke ŝi tion estus farinta? Kaj kio estus okazinta poste kun ŝi?" Oreluj ruĝigis al doktoro Mejzlík de la pensado. "Momenton," li diris kaj eksaltis por ekscitite promeni. "Aha, aha," li vokis, "nun mi komencas tion kompreni! Tondro al tio, kia kazoj ĝi estas! Jes, tio konformiĝas. - Sinjoro Ješek havas en tio la ĉefrolon! Aha, la rondo fermiĝas! Kaj tial li, Georgo - nun mi komprenas tion! Aŭskultu, li estis lertulo, tiu reĝo Georgo!" "Li estis," diris sinjoro Divíšek pie. "Mia kara, li estis saĝa regnistro!"

"Do rigardu," komencis d-ro Mejzlík, sidiĝante sur sian propran inkujon sur la tablo, "plej probable ĝi povis okazi jene; kaj mi prenos venenon je tio, ke tiel ĝi okazis! Do unue hipotezo, kiun ni akceptos, devas inkluzivi ĉiujn donitajn faktojn; neniu, eĉ ne minimuma cirkonstanco darfus ĝin kontraui. Due, ĝi devas ilin envicigi en unusolan kontinuan historion; ju pli simpla, enfermita kaj kontinua estas la historio, des pli probable, ke la aferoj okazis tiel kaj ne alimaniere. Tion ni nomas rekonstruo de la ago, sciate? Hipotezo, kiu ĉiujn konstatitajn faktojn envicigas en la plej kontinuan kaj plej supervidatan agosinsekvon, tiu por ni senkondiĉe validas,

"To taky nejde," namítal pan Divíšek. "Kdyby pan Petr zabil Kateřinu pro cizoložství, pak by s tím její otec jenom souhlasil. Panečku, tehdy na to byli přísní." "Tak počkejte," přemýšlel dr. Mejzlík. "Řekněme, že ji zabil jenom tak; třeba se s ní pohádal –" "Pak by jí přece jen postavili náhrobek," vrtěl hlavou archivář. "To nejde. Pane, já si s tím lámu hlavu už rok, a nejde mi to dohromady."

"Hm," řekl dr. Mejzlík, dívaje se povážlivě na ten malý seznam osob. "To je zatrápená věc. Možná, že nám schází někdo pátý." "Co byste chtěl s tím pátým?" pravil vyčítavě pan Divíšek. "Vždyť si ani s těmi čtyřmi nevíte rady!" "Pak tedy to musel být někdo z těch dvou, kdo zabil Berkovce: bud' jeho tchán, nebo jeho bratr – Ale safra," vykřikl náhle, "poslouchejte, že ona to udělala ta Kateřina!" "Propána," vyhrkl archivář stísněně, "na to jsem ani nechtěl myslet! Ježíšmářjá, že by to provedla ona? A co by s ní bylo dál?" Doktoru Mejzlíkovi zrudly uši od přemýšlení. "Okamžik," řekl a vyskočil, aby vzrušeně přecházel. "Aha, aha," volal, "už do toho začínám vidět! Hrom do toho, tohle je případ! Ano, to se shoduje. – Pan Ješek v tom má hlavní roli! Aha, kruh se zavírá! A proto on Jiří – teď tomu rozumím! Poslouchejte, to byl číman, ten král Jiří!" "To byl," pravil pan Divíšek zbožně. "Panečku, to byl moudrý panovník!"

"Tak koukejte se," spustil dr. Mejzlík usedaje na svůj vlastní kalamář na stole, "nejspíš to mohlo být takhle; a já na to vezmu jed, že to tak bylo! Tedy především hypotéza, kterou přijmem, musí vzít v počet všechna daná fakta; žádná, ani sebemenší okolnost jí nesmí odporovat. Za druhé je musí vřadit do jediného souvislého děje; čím jednodušší, uzavřenější a souvislejší je děj, tím je pravděpodobnější, že se věci staly tak a ne jinak. Tomu my říkáme rekonstrukce činu, víme? Hypotéza, která všechna zjištěná fakta zařadí do nejsouvislejšího a nejpřehlednějšího dějového pásmá, ta pro nás bezpodmínečně platí,

"Ĉu vi kompreñas?" diris d-ro Mejzlík, rigardante severe la arkiviston. "Tio estas nia metoda regulo." "Jes," diris la arkivisto obeeme. "Do faktoj, kiujn ni devas konsideri, estas en probabla ordo: 1. Petro Berkovec edzinigis al si Katarinan; 2. li estis murdita; 3. Katarina malaperas sen sarkofago; 4. Henrico pereas en iu batalo; 5. la reĝo riproĉas al Ješek Skalický lian koleregemon; 6. sed li ne starigis lin antaŭ la tribunalon; Ješek Skalický iamaniere estis prava. Ĉu tio estas ĉiuj donitaj faktoj? Certe. Do plue: El komparado de la faktoj rezultas, ke Petron murdis nek Henrico, nek Ješek; kiu do povis lin murdi? Versimile Katarina. La konjekto konfirmiĝas al ni ankaŭ per tio, ke post Katarina ni havas nenion sarkofagon; probable ŝi estis ie enfosita kiel hundo. Kaj kial entute ŝi ne estis venigita antaŭ regulan tribunalon? Versimile tial, ĉar ŝin iu senkonsidere kolera venĝanto preskaŭ surloke mortigis. Ĉu li estis Henrico? Versimile ne; se Henrico punus Katarinan per morto, maljuna Ješek probable kun tio estus konsentinta; kaj kial la reĝo poste riproĉus lin pro lia senkosidera koleregemo? Do el tio rezultas, ke tiun Katarinan pereigis ŝia furiozigiĝinta patro. Kaj nun estas demando, kiu mortigis en batalo Henrikon. Sinjoro, kiu tion faris?" "Mi ne scias," elspiris la arkivisto konsternite. "Nu ja Ješek," ekkriis d-ro Mejzlík. "Homo, ja neniu alian ni havas ĉi tie! Nur per tio la tutu historio rondiĝas al ni, ĉu vi kompreñas?

Do rigardu: Katarina, edzino de Petro Berkovec - hm - kiel oni diras, ekflamis per peka amo al lia pli junu frato Henrico." "Ĉu vi havas argumentojn por tio?" demandis sinjoro Divíšek kun ega intereso. "Tio rezultas el logiko de la okazajoj," diris kun certeco d-ro Mejzlík. "Aŭskultu, aŭ temas pri mono aŭ virino; tion ni konas. Kiom multe Henrico la pasion reciprokis, tion mi ne scias; sed ĉi tie ni devas serĉi motivon, kial Katarina murdis sian edzon; kaj mi diras al vi en la okulojn," deklaris d-ro Mejzlík per potenca voĉo, "ke ŝi tion faris!" "Mi antaŭsentis tion," ekĝemis la arkivisto morne.

rozumíte?" pravil dr. Mejzlík, pohlížeje přísně na archiváře. "To je naše metodické pravidlo." "Ano," pravil archivář poslušně. "Tedy fakta, na která musíme mít zřetel, jsou v pravděpodobném pořádku: 1. Petr Berkovec pojal za chot' Kateřinu; 2. byl zavražděn; 3. Kateřina mizí bez náhrobku; 4. Jindřich bere zasvě v nějakém boji; 5. král vytýká Ješkovi Skalickému jeho prchlivost; 6. ale nepohání ho na soud; tedy Ješek Skalický byl nějakým způsobem v právu. Jsou to všechna daná fakta? Zajisté. Tedy dál: Ze srovnání těchto faktů plyne, že Petra nezavraždil Jindřich ani Ješek; kdo ho tedy mohl zavraždit? Patrně Kateřina. Ten dohad se nám potvrzuje i tím, že nemáme po Kateřině žádný náhrobek; byla nejspíš někde zahrabána jako pes. A proč vůbec nebyla pohnána na řádný soud? Patrně proto, že ji nějaký prchlivý mstitel bezmála na místě zabil. Byl to Jindřich? Patrně ne; kdyby Jindřich trestal Kateřinu smrtí, byl by s tím starý Ješek asi souhlasil; a proč by ho potom král káral za jeho prchlivost? Tedy z toho plyne, že Kateřinu utratil její rozrušený otec. A teď je otázka, kdo zabil v boji Jindřicha. Pane, kdo to udělal?" "Nevím," vydechl archivář zdrceně. "No přece Ješek," vykřikl dr. Mejzlík. "Člověče, vždyť už tu nikoho jiného nemáme! Teprve tím se nám celý příběh zaokrouhuje, chápete to?

Tedy podívejte se: Kateřina, žena Petra Berkovce, – hm, jak se říká, zahřela hříšnou láskou k jeho mladšímu bratrovi Jindřichovi." "Máte na to doklady?" ptal se pan Divíšek s ohromným zájmem. "To plyne z logiky děje," řekl s určitostí dr. Mejzlík. "Poslouchejte, bud' jde o peníze, nebo o ženskou; to my známe. Jak dalece Jindřich tu vášeň opětoval, to nevíme; ale tady musíme hledat motiv, proč by Katuše zavraždila svého muže; a já vám říkám do očí," prohlásil dr. Mejzlík mocným hlasem, "že ona to udělala!" "Já jsem to tušil," vzdychl archivář chmurně.

"Kaj nun aperas sur scenejo ŝia patro, Ješek Skalický, kiel familia venĝanto. Li mortigas sian filinon, ĉar li ne volas transdoni ŝin al ekzekutisto; kaj poste defias al duelo Henrikon, ĉar tiu malfeliĉa junulo estas iel kunkulpa pri la krimo kaj damno de lia solfilino. En la duelo Henriko mortas kun glavo en la mano. Kompreneble estas ĉi tie la dua alternativo: Henriko defendas Katarinan proprakorpe kontraŭ la furiozanta patro kaj en la duelo mortas. Sed la unua alternativo estas pli bona. Jen vi havas la fatalajn agojn. Kaj reĝo Georgo, sentante, kiom malmulte la homa juĝo estas kompetenta juĝi agon tiel sovaĝe justan, lasas tute prudente tiun teruran patron, tiun koleregeman venĝinton al la Dia justeco. Bona asiza tribunalo ankaŭ same agus. Antaŭ paso de unu jaro maljuna Ješek mortas pro aflikto kaj soleco; versimile je kor-apopleksio."

"Amen," diris arkivisto Divíšek, interplektante la manojn. "Tiel ĝi estis. Reĝo Georgo, kiel mi lin konas, ne povis agi alie. Aŭskultu, tiu Ješek, li estas noblega kaj kruda figuro, ĉu? Nun la kazoj estas perfekte klara; oni tion kvazaŭ vidas antaŭ si. Kaj kiel ĉio koneksas," miris sinjoro arkivisto. "Sinjoro, vi faris valoran servon al nia historia scienco; ĝi montras en drama lumo tiamajn homojn, kaj entute -" Sinjoro Divíšek mansvingis, venkita de dankemo. "Kiam aperos mia Historio de la regado de reĝo Georgo de Poděbrady, mi permesos al mi, sinjoro, sendi ĝin al vi; vi rigardos, kiel tie science mi prilaboros la kazon!"

Post kelka tempo ricevis d-ro Mejzlík dikan volumon de Historio de la regado de reĝo Georgo de Poděbrady kun arda dediĉo de arkivisto Divíšek. Li tralegis la tutan libron de A ĝis Z, ĉar - ni konfesu tion - li tre fieris, ke li partoprenas en la sciencia verko; sed nenie li ion trovis, nur sur la paĝo 471 en bibliografiaj notoj li legis la jenan: "Šebek Jaroslav, Epitomo el Historio XIV-a kaj XV-a jarcentoj, paĝo 213, letero de sinjoro Ladislao Pcháč de Olešná al sinjoro Jan Boršovský de Čerčany. Interesa, ĝis nun science nepritraktita rimarko pri Ješek Skalický de Skalice meritas specialan atenton."

A nyní se objeví na scéně její otec, Ješek Skalický, jako rodinný mstitel. Zabije svou dceru, protože ji nechce odevzdat katovi; a pak vyzve na souboj Jindřicha, protože ten nešťastný mladík je jaksi spoluvinen ze zločinu a zatracení jeho jediné dcery. V tom souboji Jindřich padne s mečem v ruce. Ovšem je tu druhá alternativa: Jindřich chrání Kateřinu vlastním tělem před rozrušeným otcem a v souboji padne. Ale ta první alternativa je lepší. Tady máte ty neblahé skutky. A král Jiří, protože cítí, jak málo je lidský soud povolán soudit čin tak divoce spravedlivý, ponechává docela rozumně toho strašlivého otce, toho prchlivého mstitele spravedlnosti boží. Slušná porota by to taky tak udělala. Do roka pak starý Ješek umírá žalem a samotou; nejspíš srdeční mrtvice."

"Amen," řekl archivář Divíšek spínaje ruce. "Tak to bylo. Král Jiří, jak ho znám, nemohl jednat jinak. Poslouchejte, ten Ješek, to je skvostná a drsná postava, že? Ted' je ten případ dokonale jasný; člověk to zrovna vidí před sebou. A jak to všecko souvisí," divil se pan archivář. "Pane, prokázal jste cennou službu naší historické vědě; to vrhá tak dramatické světlo na tehdejší lidi, a vůbec -" Pan Divíšek mávl rukou překonán vděčností. "Až vyjdou mé Dějiny vlády krále Jiříka z Poděbrad, dovolím si vám je, pane, poslat; to budete koukat, jak tam ten případ vědecky zpracuju!"

Po čase opravdu dostal dr. Mejzlík mohutný svazek Dějin vlády krále Jiříka z Poděbrad s vřelým věnováním archiváře Divíška. Pročetl celou knihu od A až do Z, nebot' – přiznejme to – byl velmi hrd, že má podíl na vědeckém díle; ale nenašel nikde nic, až teprve na stránce 471 v bibliografických poznámkách četl toto: Šebek Jaroslav, Regesta XIV. a XV. století, str. 213, dopis pana Ladislava Pcháče z Olešné panu Janu Boršovskému z Čerčan. Zajímavá, vědecky dosud nezpracovaná poznámka o Ješku Skalickém ze Skalice zasluguje zvláštní pozornosti.